# LA PACDEFENDANTO

N-o. 48-49 (58) NEREGULA INFORMA CIRKULERO POR ĈEĤOSLOVAKIO Nov. /Dec. 1956.

---

## Z A M E N H O F A   D E C E M B R O

En la tuta mondo decembro estas festata kiel monato rememoranta nin pri la vivo kaj verko de L. L. Zamenhof. Ni konscias, ke lia Pacama verko, la internacia lingvo, nun konkeras la mondon k. ĝiaj fidelaj semantoj trov. igas en ĉiuj mondanguloj.

Kiam ni foliumas en diversaj Esparanto-gazetoj, revuoj, informiloj, facile ni ekhavas la impreson, ke tiuj ĉi presaĵoj apartenas al pluraj batalantaj frakcioj, kiuj volas konvinkigi la esperantistan publikon kaj altiri ĝin al sia "vero", kiu estas la ĝusta tiel la novbakita esperantisto troviĝas en ĥaoso, el kiu plurfoje lin savas la forlaso de la movado. Alia denove hardiĝas, rezistas, sed pri la utilo aŭ malo de plej diversaj kvereloj inter la movadaj frakcioj.

Siatempe la ĉeĥoslovaka Esperanto-movado apartenis inter la plejfortajn de la esperantista mondo. La jaro 1952 - finigo de la Asocia ekzisto – signifis certan stagnon de la movado. Vere nur stagnon - ĉar alio ĉe tiel forta movado ne estas ebla. Nia movado perdis sian centran gvidadon, sed inter la membraro ĝi daŭrigis sian laboron, kelkfoje tre turmentata kaj malhelpata de oficialaj instancoj.

En tiu, por nia movado, malfacila tempo ankaŭ kelkaj homoj ĝojis dissemante diferencojn en la opiniojn de la enlandaj gvidantoj. Sed ili forgesis gravan veron: ke ne temas pri gvidantoj, sed nur kaj nur pri la esperantistaro mem, kiu pli malpli frue forigos ĉion nebonan, kio baris la vojon de evoluo.

Ankaŭ ni sciis, ke en la landoj de Ĉeĥoslovakio: la movado devas havi liberan vojon kaj al la taga de Zamenhof ni donas al vi jenan kontribuon:

konsoliditan, harmonian movadon de ĉeĥaj, slovakaj kaj alilingvaj esperantistoj, vivantaj en la ĉeĥoslovaka ŝtato, kiuj volas pere de Esperanto ĉiam dissemi purajn porpacajn ideojn.

Jes, ni scias kio grave bremsas nian progreson: malhavo de oficiala centra gvidado, de presorgano, centra oficejo, manko de lernolibroj, literaturo kaj alia bezonata materialo.

Laŭ la lastaj enketitaj informoj, tiuj ĉi revoj aspektas fariĝi reale proksimiĝantaj faktoj.

Pro tio ni ĉiuj eniru la Novan Jaron 1957an kun forta espero kaj firma konvinko, ke fine kaj spite la ĝisnunaj malhelpaĵoj, baldaŭ venos la tempo kaj tago, kiam ni en la urbo O l o m o u c povos etendi la manojn al ĉiu homo de bona volo, kies celo estas, pere de nia kara lingvo Esperanto firmigi la mondpacon kaj kontribui al kreo de harmonia kunvivo de la turnentata kaj suferanta homaro!

Josef VÍTEK prezidanto de
TUTŜTATA KONSULTA KOMITATO DE ESPERANTISTOJ /TKKE/ en Ĉ. S. R.
Rudol BURDA
prezidanto de - MONDPACA ESPERANTISTA MOVADO/MEM/

SUR LA KAMPO DE GLORO

Vokis Hitler furioze en prelego longa sia -
kaj al multaj lia diro sonis kvazaŭ vorto Dia:
"Kiu fronton mem ne iros, mortos hejme en malgloro,
kiu iros, falos ankaŭ, sed sur kampo de la gloro!"
Ĉio estas en memoro.
Jen mi vidis en la Odro la kadavron de soldato,
oficiro, ĉar laŭ rango estis li leŭtenanto.
Kuŝis li dum dekkvar tagoj, krurojn supre la
kapon en rivera akvo havis, ne bezonis li jam sapon.
Li ankoraŭ havis mapon.
La pafilon en la mano li soldate tenis spasme.
Ĝi ŝarĝita plena estis, ja ne pafis li malame.
Nur obeis la "gvidanton". Sur la kampo "de la
gloro" falis, kvankam volis vivi, bati, lia juna koro.
Frue venis lasta horo.
Viglu homoj konsciencaj! Paco nur vin povas savi,
do neniam plu militon! Jam buĉado ĉesis ravi!
Ĉiu ŝatas propran vivon. Paco estas granda riĉo.
Sur glorkanpo glore morti estas nura malfeliĉo.
"Gloro" estas superstiĉo.

Originale de Antonín CHRÁPAVÝ, OSTRAVA, Ĉehoslov.

PAROLOJ NE SUFIĈAS!

Bovido blekas ĝeme
en la buĉeja korto,
helpvokas ĝi krurtreme
pro tim' de frua morto.

Indignas du virinoj
kun larmoj pro kompato:
"Kruelaj hom-inklinoj!
"Terura kultur-stato!"

Sed jam post unu horo
aĉetas por la festo
la du en bonhumoro
viandon de la besto.

Foriĝas ja suferoj
ne per kompat-parolo;
faras karakteroj
kun tre agema volo!

originalo
de Josef BURGER
KLARENTAL- Saarlando.

ESPERANTO KAJ LA KOMUNISTA JUNULARO

Esp-o faris lastatempe en nia urbo bonajn sukcesojn. Al tio helpis artikoloj aperintaj en la komunista junulargazeto. Ĉe kelkaj entreprenoj jam funkcias kursoj kaj rondetoj. Post 20jara silento ni reaktiviĝis. Jam kelkfoje mi prelegis pri Esp-o en diversaj uzinoj. Nun mi gvidas kurson en mezlernejo, kie mi estas instruisto de rusa lingvo k. literaturo. Mi ankaŭ renovigas mian traduklaboron. Ĵus mi tradukas versaĵon "SOVJETA PASPORTO" de Majakovski. Miaj lernantoj serĉas korespondantojn.

P. ASTAFJEF

Škola 84, Kirov-ŝoseo, KUJBIŜEV sur Volga, Sovjet-Unio.

PREPAROJ POR LA JUNULARA FESTIVALO

MINSK /Bielorusio/. En la Palaco de pioniroj en Minsk okazis prelego pri la rolo de Esp-o. por la kunligo de tutmonda junularo. Sekvis fondigo de Esp-rondeto. Samon ni preparas en la Politeknika Instituto kaj en la Sindikata Kulturdomo. Multaj deziras korespondadi kan ĉiuj landoj. Skribu amass al nia adreso: Esp-rondeto, Dvorez Pionerov, Ul. Engelsa 42, MINSK, Sovjet-Unio.

K-do Nikola G. KOLAROV, Tirnovo 21, KAZANLIK, Bulgario, deziras korespon. kaj interŝanĝi il. p.k. kaj p.m. kun ĉiuj landoj. Raportas por E-gazetoj.

ESPERANTO ENPENETRAS LERNEJON

En du lernejoj de urbo RADEBEUL, Germanio-DDR, funkcias kursoj por infanoj.

Inter la infanoj estas granda intereso. En la lerneje Mittelscbule Kötzschenbreda, Harmoniestr, RADEBEUL, DDR, deziras ligi kontakton 35 infanoj kun eksterlandaj infanoj.
En lernejo Grundschule Oberort, Pionier-grupe, RADEBEUL-Oberort, DDR deziras koresp. 3 infanoj. Eksterlandaj gok-doj bonvolu subteni ilian entuziasnon kaj kontaktigu ilin kun vialandaj infanoj.

W. RANFT,
Freiligrathstr. 4, RADEBEUL.

DUCENT KURSANOJ
de ĉiuj profesio j kaj aĝoj dezir. koresp. pri ĉiuj temoj k. interŝanĝi il p. k., ptm. kaj Esp-gazetojn. Unuafoje skribu al la kursgvidantino: Alma Hekko, Rattaskaevu 6-9, TALLIN, Estonia S. S. R.

NI RECENZAS
Du libroj origin. en Esp-o :"INFANA RASO" de William AULD, 104 paĝoj, kaj "ESEOJ" de G. WARINGHIEN, 236 paĝoj. Ambaŭ eldonitaj de J. Régulo Perez, Kanariaj Insuloj:
Pro absoluta manko de loko ni nur povas varme rekomendi ĉi librojn al ĉiuj progresintaj esperantistoj. Petu ilin de viaj eksterlandaj amikoj.

## "LA PACDEFENDANTO" ĈESAS APERI

Bedaŭrinda afero, sed ne ekzistas alia ebleco. Ĝis ĉi numero mi klopodis laŭ ĉiuj miaj fortoj doni a1 niaj amikoj ĉi kontaktilon kaj informilon por kuraĝigi ilin en la batalo por nia prava afero. Kvankam malhelpoj kaj obstakloj ofte starigis min en preskaŭ senesperan situacion, la likvidiĝo de nia landa asocio, la likvidiĝo de nia rondeto ĉe Kleriga Societo en Plzeň (1953), oficiala forpreno de nia klubejo kie ni pretigadis ĉi informilon, la batalo kaj kalumniado kontraŭ Esperanto dum la Stalinkutt-periodo, la perdo de nia firmao, kiu estis eldonanto antaŭ unu jaro kaj la oftaj financaj malfacilaĵoj ktp. Nur la amaso da simpati- kaj solidarec-esprimoj, kiuj atingis min ĉiutage de en- kaj eksterlandaj gek-doj kapablis doni al mi forton kaj rezistemon kontrau ĉiuj tiuj malhelpoj.

Mi volas esti sincera: jam somere en kunsido de TKKE, okazinta en Doksy, mi proklamis en la nomo de la ĉeĥoslovaka esp-pacmovado, ke tuj post apero de centra ĉeĥosl. Esp-organo mi ĉesos la pluan eldonadon de "LP" kondiĉe ke la nova centra organo disponigos al ni lokon por informoj pri nia movado. La proklamo estis de ĉiuj TKKE-anoj kun entusiasmo akceptita, ĉar ĝi firmigos la unuecon de la Esperanto-movado en ĈSR.

La cirkonstancoj bedaŭrinde devigas min fini la eldonadon antaŭtempe, kiam ankoraŭ ne estas garantiita la apero de nova kaj presita centra organo. Kvankam "L.P." eatas eldonata de la Esp-sekcio de Distrikta Pac-komitato en Mikulov kiel informa cirkulero laŭ tute legala formo kaj kutimo, tamen en urbo Plzeň ĝi estas redaktata kaj multobligata. La Esp-rondeto ĉi tie ree perdis sian patronan organizon kaj estas sen firmao do sekve, eksterleĝa. Jam antaŭ tri monatoj ni skribe petis la

estraron de la plejgranda uzina klubo en nia urbo, la klubon de Lenin-Uzinoj (antaŭe: Skoda-Uzinoj), ke tiu akceptu nian Esp-rondeton, kiu perdis la ekzistorajton, ĉar ĝia patrona klubo, la klubo de poŝtistoj likvidiĝis pro manko da interesuloj. Bedaŭrinde malgraŭ personaj intervenoj ni ĝis nun ne ricevis favoran respondon.

Tia sinteno ne mirigas nin, ĉar siatempe kaj ankoraŭ nun daŭrigas vigla kampanjo flanke de ĉefaj lokaj partifunkciuloj kontraŭ Esperanto, en kiu ili ŝtampis la movadon kosmopolitan kaj proklamis la lingvon, kapitalistan. Kompreneble tia kampanjo en kunvenoj kaj konferencoj de partifunkciuloj ne nur avertis, sed eĉ timigis la klubestrojn toleri aŭ krei en la kadro de uzinaj kaj kulturaj kluboj Esperanto-rondetojn. Malgraŭ tio la rondeto en Plzeň sin vivtenis sen patroneco, en la espero, ke post la malkovro de la Stalinkulto la kurzo de la partigvidantoj ankaŭ en Plzeň ŝanĝiĝos kaj la estraro de la klubo de Lenin-Uzinoj nian rondeten akceptos.

Antaŭ ol povis tiel okazi, vizitis min ano de ŝtata sekureco kaj ordonis ĉesigon de ĉiu ajn organiza agado de nia rondeto, ĉesigon de kursoj kaj forigon de ĉiuj ekspoziciaj kestoj el la stratoj de nia urbo, kvankam en ili ni ekspoziciis speciale pacpropagandan materialon, bildkartojn kaj fotojn el Sovjet-Unio kaj popoldemokrat. landoj. La kaŭzo de la malpermeso estas, ke ni ne apartenas al oficiala klubo. Parte eble ankaŭ ludas rolon, ke mi ne plu estas membro de la partio.

Pri tiu stato mi informis la ĝen. sekretarion de MEM, k-don Balague, kiu promesis fari intervencion ĉe la Ĉeĥosl. Packomitato, particentro kaj ĉe la konc. ministerio. Ankaŭ flanke de la Monda Packonsilantaro oni promesis ntervencion. Ja certe ne necesas apliki demokr. leĝojn kontraŭ pacdefendaj organizoj, se tiu ne proprakulpe povas esti ano de iu oficiala klubo.

Certe niaj karaj legantoj komprenos, ke en tia situacio estus riska daŭrigi la eldonadon, respektive la redaktadon kaj multobligadon en nia urbo. Mi eĉ ne scias nun, kiam mi skribas ĉi liniojn, ĉu mi sukcesos ankoraŭ tiun ĉi lastan numeron al vi liveri.

Ne nur la totala financa mizero kaj la obstakloj flanke de lokaj oficialaj instancoj malhelpas, sed ankaŭ la internacia situacio estas tiom streĉita kaj egalas barelon da benzino en proksimeco de fajro, kiu povas ĉiumomente eksplodi. Nun la Sekurec-komisiono de UNO sin okupas pri la konflikto por la Suez-kanalo. Samtempe staras en flamoj Budapesto. En Polio la situacio ŝajne ankoraŭ ne troviĝas en normalaj formoj. Danĝero ĉie minacas al la paco. En kazo de milito kompreneble finiĝus ĉiuj internaciaj rilatoj kaj ankaŭ la esperantistoj perdus la eblecon interkontakti. La kontaktoj kun Hungario jam estas rompitaj. El Polio ni ĝis nun ne havas raporton, nur sensignifaj poŝtkartoj atingas nian landon. Kiu povas antaŭdiri, kiel tiu ĉi situacio pluen evoluiĝos?

Karaj gek-doj, ne opiniu, ke mi nun subite fariĝis pesimisto. Tute male, sed mi nur kredas, necese diri al vi, laŭ la vortoj de Lenin, la veran situacion kiel ni mem ĝin vidas kaj en kiu speciale troviĝas nia rondeto en Plzeň. Nuntempe neniu alia rondeto en nia Respubliko travivas similan krizon. En ĉiuj ceteraj urboj ili ĝuas laŭleĝan eblecon ankoraŭ organizite labori en la kadro de diversaj oficialaj kluboj. Do tute ne estas kaŭzo perdi la esperon pro la malfeliĉo de sola rondeto en Plzeň, kvankam ĝi ludis gravan rolon en nia movado. K-do. Josef Vitek, la prezidanto de TKKE jam faris intervencion en la koncerna ministerio kaj ni, en Plzeň, esperas, ke nia situacio

fine ree pliboniĝos. Krom tio ni esperu, ke la TKKE baldaŭ ricevos la permeson aranĝi tutŝtatan konferencon kaj fondi centran organizon kun eldono de oficiala presita organo en kiu poste certe ankaŭ troviĝos loko por la esperantista pacmovado.

Mi persone petas ĉiujn legantojn ke ili de nun sin turnu rilate ricevon de informoj kaj konsilo al la funkciuloj de TKKF, k-do. Miloŝ RUDOLF, Wanklova 14, OLOMOUC kaj k-do Josef VÍTEK, Jungmanova 24, PRAHA -II aŭ al la prez. de la klubo en Praha, k-do. Jar. ŠUTSTR, Dlouhá ĉ. 10, PRAHA-II, ĉar nuntempe mi tute ne havas la necesan monon por afranki respondojn.

Niaj abonantoj bonvolu sin turni al la klubo en Praha, ĉe kiu ili povas intertempe aboni por la nova jaro ties "BULTENO"n kaj "INFORMILon de TKKE", ĝis kiam TKKE ne ricevos permeson eldoni presitan gazeton tutŝtatan.

Rilate la ĝisnunan interŝanĝon de nia L.P. kun alilandaj redakcioj, ni ankoraŭ pritraktos kun TKKE kaj ni esperas ke ĝi aŭ la klubo en Praha ankaŭ kapablos ek de la nova jaro daŭrigi la ĉeĥoslovakan eldonon de "PACO" kaj zorgi pri ties distribuado inter la ĉeĥosl. abonantoj.

En ĉi lasta eldono mi sincere dankas al ĉiuj kunlaborantoj kaj al ĉiuj gek-doj, kiuj ĝis nun oferemo helpis per mondonacoj vivteni nian organon kaj ankaŭ al ĉiuj aktivuloj kiuj per sinoferemo helpis en nia batalo. Apartan dankon meritas nia brava k-do pastro kaj kanoniko Alfred MACEK el Mikulov, kiu savis nian organon en la plej malfavora situacio, prizorginte ĝian pluan eldonadon pere de la Esp-sekcio ĉe la Distrikta Packomitato en Mikulov kaj persone transprenis ties distribuadon.

Nia batalo por Esperanto kaj la mondpaco daŭras, ĝi ne povas ĉesi pli frue ol tiam, kiam malaperos la lingvaj baroj kaj malamikeco inter la popoloj. Dum kvin malfacilaj jaroj "LA PACDEFENDANTO" donis al vi direktivojn kaj sufiĉajn instruojn. Daŭrigu vian p1uan agndon en ties senco! Restu fidelaj al nia komuna idealo! Batalu plu en ĉiu ajn cirkonstanco por ĝia efektivigo!

Rudolf BURDA

## SUKCESPLENA PROPAGANDO

En la girnazio de Vasvár/Hungar./ funkcias Esp-kurso por 19 komencantoj. Ĉiun duan dimanĉon okazas klubkunveno, Favora artikolo aperis en la landa sindik. pedagogia gaaeto "Nevelök Lapja" de 15. 9. 55. Sekve de ĉi artikolo jam 5 diversaj lernejoj oficiale petis de mi helpon kaj konsilon rilate instruadon de Esperanto. Kun ĉiuj jam mi kontaktas. La internacia gazeto de Monda Junularo en Budapest, adr. Benczur u. 34, aperigas ekdo septembro regule Esp-rubrikon. La unua alportis artikolon da Márton Lajos "Kio estas Esperanto". Estus grave al ĉi rubriko kontribui.

D-ro. J.KONDOR

## Ŝ I R M A D O   K O N T R A Ŭ   A T O M A R M I L O J

Mi respondas a1 la kritika artikolo de japana kamarado Min tre ĝojigis, ke mia artikolo trovis eĥon.

Kun plena respondeco ni konscias, ke milito eĉ uzanta novajn armilojn kun granda efiketendo estas pro sia terura pereigebleco malfacile imagebla. Ni konscias, ke atomarmiloj estis uzitaj jam dum la lasta milito kaj ke la ŝtato, kiu misuzis ilin,

nun plue serĉas per eksperimentado atingi ankoraŭ pli grandan efikon, eĉ en la nuna tempo de vojserĉado por alproksimiĝo de la nacioj. Ĝis kiam ne finos la eksperimentoj kun tiuj armiloj, ĝis kiam ne ĉesos la plua fabrikado kaj ne estos neniigitaj ĉiuj ĝisnunaj rezervoj, ni ne havos trankvilon, ke oni ilin ne uzos.

El tiu vidpunkto konsekvencis mia lasta artikolo kaj sekve ĉiam aktualas, dediĉi al problemoj de civil-protektado okaze de atom-armila uzo pli grandan atenton, por ke niaj popoloj estu informitaj kaj ne submetiĝu al atom-diplomatia timigado de Usono.

Instruita loĝantaro, ekzercitaj 1aborantoj de civila protektoservo (plue CP) kaj samaritanoj, ĉiuj restas pli instruitaj por la kazo de neceso, eventuale ankaŭ por likvidi la sekvojn de atomarmila uzo kontraŭ la postfronto, ol estis la CP de Japanio en 1945. La ĥirurgia flegado de brulvundoj, sangotransfuzoj, sangokonservoj, uzo de antibiotikoj k. a., ĉio ĉi estas senlima progreso kompare al la jaro 1945. En la Popoldemokratioj - la landoj de la pac-tendaro, la organizo kaj aktivado de kuracista servo de la civila defendo tre diferencas de tiu en la imperialistaj landoj, ĉar ĝi kreiĝas el tute alia socia bazo. Rilate al la rapida progreso de la batalekniko estas senkondiĉe necese interkonatiĝi kun faktaj materialoj, kritike ilin pritaksi kaj kontribui al krea disvolviĝo de problemoj de sanitara defendo.

Ek de la dua mondmilito pro influo de A- kaj H-armiloj kaj per la influo de novaj rapidaj transportrimedoj, la vundigebleco de la postfronto kompreneble pligrandiĝis. Jam dum la dua mondmilito oni parolis pri milito "totala". Nuntempe estas kompreneble, ke per la novaj bataliloj ebligas detrui praktike en multe pli granda amplekso urbojn sur iu ajn loko de la monda surfaco. La CP en ĉiuj landoj devas malebligi panikon kaj timon, instrui la loĝantaron pri la efikoj de atomarmiloj kaj eblecoj defendi sin kontraŭ ili. La Amerikanoj konkludas, ke en kazo de atom-atako kontraŭ urbo kun 500.000 loĝantoj estos proksimume 120. 000 perdoj. Oni konjektas, ke dum la unuaj 24 horoj el ili proksimume 40.000 mortos: kaj el la restintaj 80.000 povas morti ankoraŭ 20.000. La nombro de mortantoj malpliiĝos verŝajne en daŭro de 6 semajnoj. Oni supozas, ke el 100% da trafitoj suferos 65 procentoj je brul- kaj mekanikaj vundoj kaj la restantaj 15%oj kaŭze de radioaktiveco. Grandparte la viktimoj suferos samtempe ĉiujn tri vundspecojn.

Al la radiologia protektado oni dediĉas en la tuta mondo grandan atenton. Ni bono konscias pri la intenca subtaksado de la efikoj de radioaktiveco fare de la usona propagando rilate al la postuloj de la publika opinio pri malpermeso de eksperimentoj kun la A- kaj H-armiloj. Nia sanitaro estas relative tre bone instruata kaj interkonatigata kun la malsanoj kaŭzitaj de radiado. Okaze de krima misuzo de la atomenergio estiĝus akuta malsaniĝo pro radiado, krom la efikoj de la premondoj k. varmegradiado. La kuracado dependas de la stadioj kaj doza alteco de la absorbita radiado. Oni distingas kvar stadiojn:

1. stadio : periodo do komencaj simptomoj,
2. stadio: periodo sen klinikaj simptomoj,
3. stadio: periodo de grandigantaj klinikaj simptomoj,
4. stadio: periodo de resanigado.

Ni konas la priskribon de Hampelmann-malsanuloj en Japanio, la komunikaĵojn de s-ino Guskov kaj s-ro Bajsogolov pri la japanaj fiŝistoj de Marshall-

insuloj, trafitaj de radioaktiva polvo el nubo post eksperimenta eksplodo de hidrogenbombo sur Bikini. El la tradukoj de De Courscy ni studia la demonstracion de sangŝanĝoj ĉe la trafitaj Japanoj. De japanaj aŭtoroj ni eksciis, ke soldatoj el la trafita regiono, kiuj havis rimarkindan malpliigon de blankaj sangeroj, dum la unua semajno post la eksplodo sin sentis tute bone kaj sane, faris sian deĵoron kaj ĝis post 5-4 semajnoj evidentiĝis ĉe ili tipa klinika aperaĵo de la tria stadio de malsaniĝo post radiado.

La akuta malsaniĝo kaŭze de la radioaktiveco estas relative bone studata, oni esploras ankaŭ kun bestoj. Fakto estas, ke la daŭro de transvivo ĉe trafitaj personoj dependas de la relativa dozo, ilia rezistemo kaj la eksteraj kondiĉoj. Tial gravas kaj estas ĝusta la frutempa kuraca proccdo. La mortkazoj ne devas veni nur post masiva dozo de radiado, sed de aliĝantaj sekundaraj ŝanĝoj, brulvundiĝoj, infektoj ktp.

Ni scias, ke ankoraŭ longtempe, dum jaroj post la radiado, restas daŭraj funkcio- kaj morfologioŝanĝoj de la sangoelementoj. Ĉe la transvivontoj estas pli ofta apero de leŭkemio kaj aliaj danĝeraj kaj tumoraj malsaniĝoj. Estiĝas sterileco kaj ĉe gravedaj virinoj pli verŝajnas abortoj kaj misnaskoj kiel post observoj konstatis Yamasaki kaj Wrigt. Duonblindeco ĝis totala blindiĝo povas aperi eĉ post jaroj.

Ne eblas ĉion laŭfake priskribi en ĉi gazeto. En nova milito - la 3. a mondmilito, Okcidenta Germanio laŭdire fariĝos strategia ekmarŝejo. Militplanon ellaboris la stabo de la usona armeo, celante plenumi la ekspansiajn sopirojn de usonaj monopolistoj, en kunlaboro kun la iamaj naziistaj generaloj Manteuffel kaj Speidel. La plano estas agresiva, direktata kontraŭ la popoldemokrataj landoj. Laŭ la agresoroj Usono restus netuŝota. La usonaj monopolistoj opinias akiri la popolon de okc. Germanio por la freneza milito. Okcidenta Germanio ŝanĝiĝus en maron da flamoj, ĉar sur ties teritorio troviĝas bazoj de atomaj armiloj kaj ĝi estas plenŝtopita de benzin-petrol- kaj alispecaj rezervoj.

La okc. Germanoj scias, ke laŭ tiu plano ili devus batali por la interesoj de usonaj kaj anglaj monopolistoj ĝis la lasta soldato. La diableco de tiu ĉi militplano evidentiĝas en tio, ka la okcidentgermana registaro en Bonn konscias pri tio, ke dum la unua milita etapo la Germana Liga Respubliko estos eksponita tute al la pereigaj efikoj de la atom- kaj hidrogen-armiloj. Tiamaniere la teritorio de okcidenta Germanio fariĝus dezerto en kiu por ĉiam malaperus la historiaj kulturmemoraĵoj de la germana laborularo, kiu militon ne deziras. La reorganizita "Wehrmacht" (Militpotenco) estas ekipota per armiloj por amasa pereigado (atomaj, kemiaj kaj biologiaj) rememoras la juĝproceson de Ĥabarovsk (1949), ili ne forgesas la juĝon de Nürnberg. En la germana Liga Respubliko tre malfacile naskiĝas la nova "Wehrmacht". El la aliĝintaj libervoluloj du trionoj estas anoj de la estinta nazi-wehrmacht (faŝista militpotenco). Malpli ol triono estas viroj sub 50 jaroj. La okcident-germana junularo rifuzas oferi siajn vivojn por la interesoj de la militaristaj rondoj.

Interesaj estas la ekkonoj el lastaj manovroj de NATO, okaziĝintaj kun atomarmiloj sur la teritorio de okc. Germanio. Tiuj montris al la popolo, kiajn senlimajn domaĝojn povus kaŭzi milito. Estis konstatite, ke dum tiuj manovroj en daŭro de 6 tagoj estis faligitaj sur la teritorion de GLR 268 atomaj ekzerc-bomboj, sen ke la defendservo de NATO estus sukcesinta tion malhelpi. Tion konfesis la

gazeto "Militärpolitisches Forum". Do la germana popolo el tiuj pasintaj manovroj rekte instruiĝis, ke eksplodo de tria mondmilito signifus por ĝi terurajn vivperdojn precipe en la densloĝata okcid. Germanio.

La tutmonda laborularo, sen diferenco de nacioj, rasoj kaj kulturo, parolas egalvoĉe: ĉesigi la preparojn de nova freneza milito kaj konservi la pacon! Ĉi voĉo estas ĉiam pli forta en la tuta mondo, ĝi aŭdiĝas en Okcidentgermanio kaj en Usono la popoloj de la pactendaro ĉiam pli ligiĝas kun la ekspluatitaj popoloj de kapitalistaj landoj. Ni interkonsentas kun vi, fratoj en Japanio, ke eksplodigo de nova milito estas unu el la lastaj antaŭmortaj agoniaj eksperimentoj de nepacigemaj malamikoj de la homa civilizacio, la lasta konvulsia provo, savi la putrigantan kapitalistan sistemon je la konto de la homaro laboranta, domaĝe al ĝia feliĉo, amo kaj laboro. Ni etendas al vi niajn manojn al la komuna batalo por la paco.

Subkolonelo d-ro. V. ŘEPKA PLZEŇ - Ĉeĥoslovakio

## RADIO MOSKVA PAROLIS ESPERANTE

Mi vojaĝis tra Volga, vizitinte la urbojn Gorkij, Kujbiŝev, Saratov kaj Astrahan. En tiuj urboj la Esperanto-movado renaskiĝis gvidata de spertaj, malnovaj esperantistoj. En Astrahan jam funkcias Esp-rondeto ĉe la Distrikta Komitato de komunista junularo (VLKSM). Nur granda estas bedaŭro, ke tute mankas esperantaĵoj.

En Moskvo funkcias 10 Esperanto rondetoj, el kiuj 5 en la Moskva Ŝtata Universitato kaj unu ĉe la junulara klubo "Fakel" (Torĉo) en la kulturdomo de Industri-produktiva kooperativo (A. MOSKVA, B. Ĥaritonievskij per, Kujbiŝevskij raj.)

Se en la jaro 1955 en sovjetuniaj gazetoj aperis nur 3 notoj pri Esp-o, en jaro 1956 ĝis oktobro jam aperis en diversaj gazetoj, pli ol 30 artikoloj k. notoj. Tio signifas, ke Esperanto sukcesplene marŝas antaŭen, malgraŭ ekzisto de multaj kontraŭuloj.

La 7. de oktobro 1956 la Sovjetunia Preparkomitato de la Junulara Festivalo faris raporton per moskva radiostacio pri modela laboro en Domo de Kulturo de Industri-produktivaj Kooperativoj en Leningrado speciale atentigante pri la agado de tieaj esperantistoj. Poste sekvis parolado en Esperanto-lingvo por eksterlandanoj kun rusa traduko. Mi nun gvidas la duan rondeton ĉe la filologia fakultato en Moskva Universitato. Entute funkcias 7 rondetoj ĉe diversaj fakultatoj en Moskvo.

S. V. SARIĈEV
MOSKVA-K-9, Abon. Kesto 1295

## GRANDAJ SUKCESOJ EN ESTONIO

De nia korespondanto A. Munak el Estonia S.S.R., ni ricevis jenajn raportojn:

La 21. de okt. mi estis en urbo Pärnu kaj la 22an en Tallin, kie mi prelegis en Esp-kurso. Poste mi partoprenis prezenton de Viva Gazeto n-o 9, kiun partoprenas regule ĉiulunde centoj da interesuloj. Tie mi rakontis pri Esp-novaĵoj.

En Kilingi-Nomme funkcias kurso kun 55 lernantoj. En kuracloko urbo Pärnu

loka gazeto "Pärnu Komunist" publikis anoncon por Esperanto kurso. Dum tri tagoj registriĝis pli ol 300 interesuloj. Necesis ĉesi la registradon, ĉar ne eblas ĉiujn akcepti. La unua kurso komencis la 11. de okt. kun. 50 partoprenantoj. Sekvantan semajnon komencis du aliaj kursoj. Ĉiujn grupojn gvidas k-ino Hilda Pöld, ĉar mankas kurs-gvidantoj.

En urbo Sindi komencis kurso la 12an de okt. kun 100 lernantoj en du grupoj. Gvidas ankaŭ k-dino Pöld.

En urbeto Pärnu-Jaagrupi funkcias jam du monatojn Esp. kurso kun 30 lernantoj. Ĝin gvidas instruistino, k-dino Kildenan.

En Tallin funkcias nun 24 Esp-kursoj kaj studrondoj kun pli ol 500 gekursanoj. Inter ili estas diversprofesiaj grupoj, oficistoj, komerclaboristoj, instruistoj ktp.

En la universitata urbo Tartu finiĝis jam 4 kursoj por komencantoj kaj du novaj komencis. Prof. lingvisto Ariste baldaŭ aranĝos kurson por instruistoj kaj studentoj.

En la urbo Rakvere okazis "Tutregiona Instruista Tago", en kiu oni akceptis rezolucion al la Estona Klerecministerio por enkondnki Esperanto-instruadon en estonaj mezlereejoj libervole, komence de 1957. En Rakvere gvidas kursojn pedagogo de instruista instituto k-do Kurm.

Preskaŭ regule aperigas Esperanto novaĵojn lokaj k. centraj gazetoj kaj estona radio en Tallin.

Estante en Tallin, mi vizitis vic-ministron k-don Jaanimägi de Kulturministerio. Parolinte pri Esper. demandoj li diris, ke la ŝtata literatura ccntro tuj eldonas Esper. lernolibron kaj vortarojn kiam la manuskriptoj estas pretaj. Lernolibron ni donos ankoraŭ ĉi monate en presejon. Inter aliaj mi proponis aranĝon de tutlanda esperantista konferenco ankoraŭ en tiu jaro aŭ en komenco de la nova, por ellabori komunan planon por la movado en Estonio. Vicministro Jaanimägi rilatis afable al ĉiuj priparolitaj temoj. Do printempe mi semis kun vi kaj aŭtune mi jam rikoltas la unuan grenon.

Arnold MUNAK
Pärnu str. 63-3, KILINGI-NOMME
Estonia S. S. R.

Rim. de red. : Povas esti, ke en iuj landoj ankoraŭ troviĝas rusaj lernolibroj, vortaroj aŭ ŝlosiloj kun la renaskiĝo da nia movado en Sovjetio fariĝas ĉi libroj en viaj bibliotekoj malpli valoraj kaj nebezonaj. Bonvolu ilin kune kun aliaj Esperantaĵoj kiujn vi povas malhavi, sendi rekte al la adresoj de k-do. S. V. Sariĉev, Poŝtkesto 1259 MOSKVA, K-9, USSR kaj al k-do. Arne MUNAK, Pärnu str. 63-3, KILINGI-NOMME Estonia S. S. R.

Certe tiuj libroj en la manoj de literatursoifantaj sovjet. k-doj. havos netakseble altan valoron.

## PRELEGO KAJ ESPOZICIO

En urbo Tula (S. U.) en la Palaco de Kulturo "MARTELO kaj RIKOLTILO" la 25. de sept. dum vespero de "Vivanta ĵurnalo" dum 15 min. prelegis pri Esp-novaĵoj k-do. Elio KISELEV fininte ĝin per tralego de la Alvoko de leningrada junularensemblo pri la moskva Festivalo. En aparta salono k-do. Kiselev aranĝis imponan Esp-ekspozicion, kiun rigardis multaj homoj, inter ili ankaŭ sveda

ĵurnalisto.

## SUKCESPLENA PRELEGO PRI ESPERANTO EN HANOI

(Raporto de la Vietnama MEM-sekcio)

La 3.10.1956 okazis en la klubo "UNUIĜO" de Hanoi granda publika kunveno en kiu prelegis du esperantistaj literaturistoj k-doj Nguyen-Hai-Trung kaj Dao-Anh-Kha pri la temo "Esperanto kaj la mondpaco".

La prelegon partoprenis pli ol 500 personoj, intelektuioj, reprezentantoj de ofic. organoj, funkciuloj de centraj kaj lokaj organizoj kaj multaj lernantoj el oficialaj kaj privataj liceoj de Hanoi.

La verkisto-poeto Nguyen-Hai-Trung prelegis je la temo "Esperanto - la internacia lingvo por paco kaj amikeco". Li detale raportis pri la tutmonda Esp-movado kaj akcentis la altan valoron, kiun Esp-o ludas en la batalo por la paco kaj interpopola amikeco. Per pasiaj vortoj li citis la vortojn de Lenin kaj pluraj eminentuloj en la mondo kiuj laŭde sin esprimis pri Esp-o.

Verkisto kaj ĵurnalisto k-do Dao Anh-Kha prelegis pri "La geniaj karakteroj de la internacia lingvo Esperanto" kaj per konkretaj ekz-oj li prezentis ĝiajn kvalitojn, similecon, klarecon, precizecorı, riĉecon kaj literaturan valoron. Li alvokis la vietnaman junularon kaj laboristaron, ke tiuj alpropriĝu, al si ĉi facilan lingvon kaj uzu ĝin por plifortigi la amikecon kun la tutmonda junularo kaj laboruloj. Dum 2 horoj kun intereso kaj entuziasmo la aŭskultantoj sekvis ĉi lingvan problemon. Dum paŭzo nombro da lernantinoj el la liceo "Trung Vuong" ĥore prezentis kantojn pri amikeco kaj paco. La prelegojn akompanis ampleksa ekspozicio de centoj da libroj, gazetoj, leteroj, fotoj kaj bild-kartoj, ricevitajn el la tuta mondo de la lernantoj de du licioj en la urbo Hanoi, Trung Vuong kaj Nguyen Trai.

Pri tiu ĉi unua plensukcesa prezentado de Esperanto en Hanoi detale raportis la ĵurnalo "POPOLO" (ĉeforgano de vietnama laborista partio) "NOVA TEMPO" kaj "ĈIUTAGA HANOI" (sendependaj ĵurnaloj), "AVANGARDO" (ĉeforgano de vietnama junulara federacio) kaj la radiostacio "VOĈO DE VIETNAMIO" dufoje detale disaŭdigis ĉi novaĵon. AVANGARDO sekve de multaj petoj flanke de junularo, poste ankoraŭ publikigis serion da artikoloj pri Esp-o de la du aŭtoroj. Jen nia respondo al la alvoko de niaj multnombraj amikoj en la tuta mondo. Kun via helpo ni certe baldaŭ atingos plenan venkon.

D.A.K. kaj N.H.T. -HANOI

## NI RECENZAS

"POLLANDO" kun bele ilustrita kovrilo, 34paĝa revuo e1 bonkvalita papero. Formato: 29x39cm Abundkolore ilustrita. Eldonejo: POLONIA. Redakcio: Mazoviecka 11, WARSZAWA, Polio. Mendojn por la gazeto akceptas: Prasa i Ksiažka, Str. Foksal 18, WARSZAWA. La revuo estas eldonata en 6 lingvoj kaj nun dank' al la Pola Esperanto-Asocio, ĝi aldoniĝas ankaŭ en Esp-o. Ĉiuj ges-anoj, kiuj havos la okazon vidi aŭ legi ĝin, skribu nepre sian opinion al Asocio de Esp-istoj en Pollando, Kozia 3, WARSZAWA. Ni povas konstati ke ĉi revuo estas vere unuaklasa ellaboraĵo, kiu honeste reprezentas la tutan kulturan vivon de la Pola Respubliko. Sole ni opinias, ke la kovrililustraĵo ne estas ĝusta, ĉar ĝi vekas la imagon, ke temas

pri ia sportrevuo kvankam la interna enhavo rilatas la tutan vivon kaj altan kulturon de la pola popolo. Eble bildo de Varsovio estus pli konvena. La revuo prezentas ankaŭ dukolonan raporton pri la historio de Esperanto kaj d-ro. Zamenhof. Se ĝi vekos internacian intereson, ĝi plu aperos regule.

"TREZORUJO-VALO TEGERNSEE", belkolora 14paĝa prospekto de ban- kaj kurac-loko Tégernsee kun abundaj ilustraĵoj kaj esp-aj tekstoj. En ĉi banloko oni kuracas kormalsanon vejnokalkumiĝon, reŭmatismon, Ishias nervmalsanojn, altan sangpremon ktp. La prospekto kun detalaj informoj estas senpage havebla ĉe: F-ino Ana M. ORTERER, Deleg. de UEA, Rathaus, /13b/ KREUTH bei Tegernsee, Deutsche Bundes Republik, Germanio-D.B.R.

"LA IDEALA NUTRAĴO" de MARTINUS, trad C. Graversen. Kontrolita de Literatura Komitato de SAT. 96paĝa tolbindita libro. Formato 13x19cm. Eldonis Spiritscienca Instituto de Martinus, Mariendalsvej 94-96, KOPENHAGO-F. Danlando. Prezo: 6.50 danaj kronoj. En ĉi verko Martinus analizas la influon de vegetarismo je la spirit-scienca vivo. Pro absoluta manko da loko ni nur povas diri, ke krom la gramatika perfekteco la legado de ĉi verko postlasas en ĉiu leganto valorajn impresojn kaj instruojn. Ni ĝin kore rekomendas al ĉiu progresema esperantisto.

VARSOVIO, Fotoalbumo kun bildoj de nova kaj malnova Varsovio, la ĉefurbo de Polio. Formato: 21x23cm. 50 paĝoj. La albumo estas havebla ĉe Asocio de Esperantistoj en Pollando, Str. Kozia 3, WARSZAWA, Polio kontraŭ alsendo de samvalora libro, gazetoj, insignoj kaj aliaj Esperantaĵoj.

LETERPAPERO, KOVERTOJ, P. K.
kun packolombo kaj esp. tekstoj, vortaroj, lernolibroj, insignoj k. diversspeca Esp-literaturo, estas havebla ĉe: J. Reiser, Nádražní č. 34 PLZEŇ, Ĉeĥoslovakio.

## KORESPONDI DEZIRAS

ESPERANTO-SEKCIO, Lien-Doan Thanh-Niĕn, Viet-Nam, HANOI, Vietnamo, junaj gestudentoj kun ĉ. landoj, precipe kun partoprenantoj de la Moskva festivalo en 1957.
K-do. Jan STRABURZYLSKI, Ul. Katovicka N0. 81, OPOLE, Polio, kun ĉ. land. per let. kaj il. p. k. Interŝ. p. m.
K-do. Roger IMBERT, 22 rue Pasteur, MIGENNES, /Yonr_e/Francio, speciale kun Sovjet-Unio kaj soc. landoj. ESPERANTO-SEKCIO, Hieu-doaň Trung hoc CHU-VAN-An, HANOI, Vietnamo, mez-grada lernejo kun samaj el ĉiuj landoj. Interŝanĝas kaj infandesegnaĵojn.
TRUNG-Hoc Son-Tay, HANOI, Vietnamo, V. N., knabina mezlernejo kun ĉiuj landoj. Interŝanĝas il. p. k. , p. m. kaj desegnaĵojn.
K-dino. Maria GRAMATIKOVA /18jara/ Str. 9ti Septembri 215, KAZANLIK, Bulgario, kun ĉiuj landoj por perfektiviĝi en Esperanto.
K-do. Zdenĉk BEDNÁŘ, Javornice 45, u RYCHNOVA n/Kněžnou, Ĉeĥoslovakio

kun ĉ. landoj. Interŝ. il. p. kaj literaturon.
ESPERANTO-RONDETO ĉe filologia Fakultato de Moskva Universitato, Ul. Niohovaja 11, P. MOSKVA, Sovjetunio, Multaj studentinoj deziras: kontakti kun ĉiuj landoj.
ESPFRANTO-GRUPO, Škola-84, Kirov-strato No. 177, KUJBIŜEV /Volga, Sovjet-Unio, 50 mezlernejanoj lernas Esperanton kaj dez. koresp. kun ĉiuj landoj. Interŝ. il. p. k. Resp. gar.
K-do. Václav TACHECÍ, Zborovská 886, KRALUPY nad Vlt., Ĉeĥoslovakio, dez. koresp. kaj interŝ. p. m. kun ĉ. land.
K-dino. Sonja ZEDNÍKOVÁ, MODŘANY u Prahy ĉ. 1482, Ĉeĥoslovakio, kun ĉ. landoj per let. kaj il. p. k. ESPERANTO-FILIO en BYDGOSZCZ aranĝos grandan ekspozicion por propagandi Esp-on. Bonvolıı sendi div. materialon al jena adreso Henryk KUDLA, Chacimska 1/10, BYDGOSZCZ, Polio, ankaŭ niaj grupanoj serĉas korespondantojn el la tuta mondo.
K-dino Erna KOHLER, Talstrasse 1, SEBNITZ (Sa. Germanio-DDR. Por pac-celoj ni intencas aranĝi letervesperon k. ekspozicion por pruvi la efikan valoron de Esp-o. Skribu amase! Ni certe respondos.
K-do. Victor Van PARYS, Rue Const- ant Parras, SALLAUMINES, P. de C., Francio, kun ĉiuj landoj.
K-dino Aleksandra SOKOLOVA, sciigas al vi, ke ŝia edzo SOKOLOV Boris Ivanoviĉ, Stalina 43/laste Lenina 34/, ZDOLBUNOVO, Roven. obl, Sovjet-Unio, mortis la 4. de majo 1956. Bonvolu ĉesi alsendon de korespondaĵoj, ĉar mi ankoraŭ ne bone komprenas Esperanton.
K-do. Ivan Kolev-NEDJALKOV, /22jar. studento/ Str. 48, N-12, b1. 3, SOFIA- 13, Bulgario, kun ĉ. landoj. Interŝ. il. p. k. kaj gazetojn.
K-do. Willi BRETSCHNEIDER, Nieuerleithe 19, PIRNA-COPITZ, Germanio-D.D.R., turista akompananto, kunsamprofesianoj de ĉeĥoslovaka "ČEDOK" kaj "TURISTA"
K-do. Ing. VAIL Mikaelo Ninij Val 19 kv. 7y KIEV, Sovjet-Unio, k. ĉ. l.
K-do. Ing. Vladimir. MIODUSEVSKIJ, Verhnij Val 54 kv. 58, KIEV, Sovjet-Unio, kun ĉiuj landoj.
K-do. Ivan Jordanov KOLEV, Strato 8-Mart No. 27, SOFIA, Bulgario, du elektromekanikistoj /komencantoj dezir. perfektivigi en Esperanto/ kun ĉiuj landoj per let. k. il. pk.
K-do. Walter NITSCHKE, Karl-Marx- strasse 51, BURGSTADT/Sa. , Germanio D. D. R. , pri ĉ. temoj kun tuta mondo. Interŝ. fotojn, gaz. , il. p. k. ktp.
K-do. HOC, Nha In Song-Lo, pho TRANG THI, HANOI, Vietnamo/eldonisto/kun ĉiuj landoj per il. p. k. kaj leter.
K-do. Nita VRLNCEANU ; Piata Republicei No. 13; MEDIAS. S, -Rumanio, ĉTona. s belajn p. m. por vir:i.. n. aj n. odrevuoj - kaj notoj de facila muziko Mi interŝangas 100-200 n. m. po unufojev sendu rekomendite.
K-do. Ing. LIU Zyn, 9, Yukung Chieh. Tiehsi Chü, Thiehsi, Ĉinio, kun ĉiulandaj geinĝeneroj pri teknikaj problemoj, precipe pri desegnado k. fabrikado de alttensiaj aparatoj. Koresp. angle, japane, germane, sed precipe esp-e, Resp. garantita.
ESPERANTO-PACRONDO, k-do o Helmut Löffler, Theaterstr č 14,

MIITWEIDA/Sa. Germanio-DDR, ni aranĝas ĉiumonate letervesperon. Sendu koresp. dezirojn, salutkartojn, infandesegnojn, filmplakatojn k. Esp-materialojn. Ni respondos certe al ĉiu.
LERNEJA KLASO kun 30 knaboj 14 j. deziras kontakti kun tutmondaj lernejoj. Adreso: Egon BROSCHE, Schillerschule, K1. 26, PIPNA. /Elbe, Germanio-DDR,
K-do. Vasil Ivanov ŜTEPKOV / tajloro RAJKOVO-Smoljansko, Bulgario, k. ĉ. landoj. Petas dikajn maŝinkudril.
K-do. S. N. SADOVIJ, U. Bogd. Hmeinickogo 45, kv. 2, ASTRAĤAN, Sovjetunio, kun ĉ. landoj,inter. librojn kaj petas Esp-aĵojn por propagando.
K-do. Vlasta B. BALCAR, Jiráskova 504, ČESKA SKALICE, Ĉeĥoslovakio, kun ĉ. landoj pri Esp-movado. Interŝanĝas il. p, k. ka.
K-do. Pi ghini. Maúro, Via Vignaleta NO. 1, MASSA, /Massa Car-n, c. /Italio, kun 14-20jaruloj el ĉ. landoj.
K-do. Friĉis KREISLERS, Rigas ielá 11, TUKUMÁ. A, Latvijas P.. SSR., Sovjet-Unio, kun ĉ. landoj pri kulturo kaj sporto. Interŝ. il. p. k. kaj p. m.
K-do. Trinh Dinh LONG, 30-Doan Tran Nghiep, HANOI, Vietnam, kun gek-doj e1 ĉ. landoj. Interŝ. fotojn, gazet. ktp.
ESPERANTO-KLUBO, Dang Xa-Hoi Viet-Nam, HANOI, Vietnamo, - profesoroj, ĵurnalistoj kaj kuracistoj dezir. serioze korespondadi kun samprofesianoj e1 ĉ.landoj.

NEFORGESU RIGARDI PLUAJN KORESPOND-ANONCOJN SUR LA PAĜO NAŬA

Eldonis: OKRESNÍ VÝBOR OBRÁNCŮ MÍRU, odbor esperantistů – MIKULOV,
Redaktis: K-do. Rudolf BURDA, Palackého náměstí č. 6, P L Z E Ň ,
Ĉ E Ĥ O S L O V A K I O